

KOMUNIKOJ

TRIMONATA BULTENO DE SPIRITISMA ELDONA ASOCIO F. V. LORENZ
Jaro 43-a BRAZILIO, OKTOBRO-NOVEMBRO-DECEMBRO 2019 N-ro 176

“Amu vian Dion per via tuta koro kaj per via tuta animo kaj per via tuta menso kaj vian proksimulon kiel vin mem.”
JESUO (Mt, 22:37-40).

“Neskuebla fido estas nur tiu, kiu povas rekte rigardi la racion en ĉiuj aĝoj de la homaro.”
KARDEC. *La Evangelio laŭ Spiritismo*.
Ĉap. 19, §7.

“Sur neŭtrala lingva fundamento, komprenante unu la alian, la popoloj faros en konsento unu grandan rondon familian.”
ZAMENHOF. *La Espero*.

FINJARA MESAĜO

Karaj samideanoj:

Ĉe la fino de 2019, kun granda ĝojo, ni skribas ĉi-vortojn, nome de la Estraro kaj Konsilantaro de Eldonejo Lorenz, precipe por danki al ĉiuj anoj, legantoj, amikoj, kunlaborantoj de nia Eldonejo.

Ĉi tiu jaro estis plena je malfacilaĵoj, sed ankaŭ je tre bonaj realigoj: niaj tradiciaj "Almanako Lorenz" kaj "Komunikoj" regule eldonitaj estas legataj en pli ol cent landoj, inkluzive per pdf-aj versioj. La eldonoj de libroj, en Esperanto, ankaŭ estas sendataj al pli ol okdek landoj, tute senpage. Ĉi jare ni eldonis la mirindan verkon "Laboristoj de la eterna vivo", kaj estas preskaŭ preta alia grava spiritisma verko: "Postmortaj verkoj", de Allan Kardec. Krome, nia teamo prelegas ĉiujare en Universalaj Kongresoj de Esperanto kaj, ene de ili, partoprenas la Movadan Foiron; sed ankaŭ ni ĉeestas la brazilajn kongresojn de Esperanto. En 2019 ni eldonis la jenajn verkojn en la portugala lingvo: "Histórias para todas as idades", "Juvenília" kaj "Quando o amor esfria".

Do, kara leganto, kiel vi povas konstati, Eldonejo Lorenz de 44 jaroj laboradas por Esperanto kaj, sen ia dubo, riĉigas la esperantistan kulturon, kiel saĝe diras Renato Corsetti:

“Eldonejo Lorenz aparte riĉigas la kulturon de Esperanto. Sen la informoj pri Spiritismo, pri Oomoto aŭ pri la bahaanoj, la kulturo de Esperanto estus multe pli malriĉa. Finfine la movado por Esperanto estas parto de ĉi tiuj movadoj, kiuj provas plibonigi la mondon”.

Karaj samideanoj, ke venu 2020 kaj kun ĝi multe da laboro, ke, fakte, ni kontribuu por ke definitive la paco regu tersurface. Feliĉan Kristnaskon kaj prosperan novjaron al ĉiuj anoj, amikoj, samideanoj. Ke 2020, kun certeco, estos alia fruktdona kaj bela jaro por ni ĉiuj! Koran kaj verdan dankon al ĉiuj!

La Estraro



Abel Gomes



Suely Alves Lopes, veteranino, bofratino de la fondinto de nia Eldonejo, Délio Pereira de Souza, ĉiam apogis nian Asocion, vera homaranino, fidela al la Interna Ideo de Esperanto. Sen ia dubo, Délio estas fiera pri sia bofratino.

Koran dankon, estimata Suely!



**Délio
kaj
Suely**

Ke la Natur' kruela estas, frato,
Vi diras; ke por vivi ja bezonas
Ke hom' kaj best' mortigu sen kompatato
Vivantajn, kiel la malsat' ordonas.

Ke en militbuĉad' la mondo dronas,
Milmile detruig'as viv' sen ŝato,
La malamikon neniu pardonas,
Detruu lin ja devas la soldato.

Vi pravas, sed memoru, ke surtere
Ne povas reĝi pac', dum la homaro
Ne vivos kiel bonaj fratoj vere;

La tera vivo estas nur preparo
Por vivo en spiritaj altaj sferoj,
En kiuj realiĝas pacesperoj.



VENCE TEU PESSIMISMO!

Dizes, meu irmão, que a Natureza é cruel; que o homem e o animal para viver necessitam matar sem compaixão outros seres por imposição da fome. Que o mundo se afoga nas hecatombes da guerra, destruindo milhares de milhares de vidas sem consideração alguma, que ao inimigo ninguém perdoa e o dever do soldado é mesmo destruí-lo.

Tens razão; mas lembra-te de que a paz não poderá reinar sobre a Terra enquanto os homens não viverem como irmãos; a vida na Terra é apenas preparação para a vida nas altas esferas espirituais, onde se realizam as esperanças da paz.

Reformador, Aŭgusto 1946, p. 189
Kunlaboris: Aymoré Vaz Pinto

LORENZ

“KOMUNIKOJ”

TRIMONATA BULTENO DE LORENZ – SPIRITISMA ELDONA ASOCIO F. V. LORENZ

Fondita la 15-an de decembro 1975

Jaro 43-a – n-ro 176 | Oktobro-Novembro-December 2019

Interreta kaj papera senpagaj eldonoj
Ĉirkaŭ dudek mil legantoj en la tuta mondo

KONTAKTIĜU KUN NI KAJ ALIĜU:

Spiritisma Eldona Asocio F. V. Lorenz
Rua Francisco Vale, 57 Engenheiro Leal
21370-171 Rio de Janeiro-RJ – Brasil (Brazilo)
Telefonoj: ☎ + 55-21-98485-4539 ☎ + 55-21-2450-4768
Skajpo: Lorenz Editora | Fejsbuko: Editora Lorenz | Retadreso: editora_lorenz@uol.com.br
Retpaĝo: <http://editoralorenz.blogspot.com.br>



Kompostita de Rogério Mota

Kuriozaĵoj el la leteroj de Zamenhof



p. al Majnov, 2.(14)* X. 1887 (o.v. V-58)

Estimata sinjoro! - Respondon je via demando kaj konsilo vi trovos en la verketo "Respondoj al la societo", kiu estos eldonita post 4-5 semajnoj. Je ĉiu okazo mi dankas vin kore por via bona volo.

Kun estimo Esperanto

*La duobla dato laŭ la Julia kaj gregoria kalendarstiloj.

1. al Majnov, 5.(17.) X. 1887 (o.v. V-59)

Estimata sinjoro! – Respondante vian leteron, mi povas vin sciigi, ke la ĵurnalo komencos eliri kredeble ĉirkaŭ la monato Januaro aŭ Februaro de l' jaro 1888, sed certe diri mi ankoraŭ ne povas, ĉar mi ankoraŭ devas nun labori ke la registaro donu al mi permeson. La plena vortaro jam estas preta, sed ĝi eliros kredeble ne tiel baldaŭ. Kian la gazeto komencos eliri, mi donos en ĝi respondojn de ĉiuj demandoj de la legantoj; en tiu gazeto estos preparolata ĉio, kio estas necesa por la lingvo internacia*.

*Ĉi tiu kaj la antaŭa letero al majnov estas ankoraŭ skribitaj kun streketoj, kiuj disigas la vortelementojn.

(Fonto: Iom Reviziita Plena Verkaro de L. L. Zamenhof. Originalaro 1. Unua etapo de Esperanto – 1878-1895. Eldonejo Ludovikito, 1989.)



La "natura", sendepende de kredoj, kulturo, sociaj tavoloj aŭ politikaj idealoj, ja fariĝis nia centra altirforto: en ĝi ni estis kreitaj kaj de ĝi dependas nia vivtenado. Sed nur en la nunaj tempoj, kiam la mediaj damaĝoj fare de la homa agado transpasas la naturkapablon refari la ekologian ekvilibron, ni fakte eksentas la neceson ŝanĝi paradigmojn.

Said Pontes de Albuquerque

Ero el la artikolo "Akvo", publikigita en **Almanako Lorenz 2016**. Se vi volos ricevi la pdf-an version de Almanako, skribu al ni.

INVITO POR ALIĜO AŬ REALIĜO 2020



Karaj geamikoj,
Alvenis tempo por aliĝi
aŭ realiĝi al nia Asocio.
Skribu al ni kaj petu vian
aliĝilon kaj ricevu,
en la komforto de
via hejmo, du librojn,
portugale aŭ esperante,
plus "Almanako(n) Lorenz"
kaj la bultenon "Komunikoj":
editora_lorenz@uol.com.br



ADOPTITAJ INFANOJ

Probal Dasgupta – Hindio



En movado por planlingvo, kie oni ofte parolas pri la granda rondo familia, estas iom grave, ke ni pensu de tempo al tempo pri la ne plene ortodoksa familia rilato inter adoptaj gepatroj kaj adoptitaj infanoj. Ilia rilato ne estas bazita sur la biologio, kaj tial ne estas rigardata kiel ‘natura’ en la komuna saĝo. Se ni al la publiko en ĉiuj landoj sukcesos prezenti nian rondon familian kiel donantan reliefan lokon al planfamilioj, tiam la akceptiĝo de la legitima valoro de planlingvo kreskos kune kun la akceptiĝo de la ‘ne vere naturaj’ rilatoj inter tiaj gepatroj kaj gefiloj. La socio komprenos ne de si mem, sed nur iom post iom, pro la klopodoj de socioprogresaj batalantoj, ke ankaŭ la tiel nomataj naturaj rilatoj estas socia fenomeno kaj konstruiĝas per sociaj amo, zorgo, alproprigo; komprenos, ke eĉ la biologiaj beboj fariĝas filoj kaj filinoj ĉar iliaj gepatroj fakte adoptas ilin, alproprigas ilin. Se ni esperantistoj kiel komunumo ne kapablos vidi la parencecon inter nia strebado kaj la batalo de adoptintoj kaj adoptitoj por plenrajta akceptiĝo, tiam ni ne plene komprenos la lokon de nia propra strebado inter la bataloj por la homa progreso.

Tre ofte oni parolas unuavice pri eŭropaj fenomenoj. Tial mi kuraĝas veti, ke vi certe aŭdis pri la sugesto, ke ĉiu eŭropano lerne ‘adoptu’ alilokan lingvon kaj amikiĝu kun ĝiaj parolantoj. Bonvolu ja mediti pri tiu sugesto – kaj similaj alikontinentaĵoj. Sed tia ‘adopto’ estas nur parolfiguro.

Ĉi tiun tekston mi dediĉas al la senmetaforaj adoptintoj, por ke la hejmoj familiaj reliefu al ni, kiuj celas “unu grandan rondon familian”. Mi invitas vin kunmediti kun mi pri tiu temo. Variigante laŭguste, iuj el vi emos pensi precipe al la adoptitaj infanoj – kaj sendube kun plena memkonscio evitos bondeziri al “tiuj kompatinduloj” ian nericevitan feliĉon. Vi certe esprimos sin kontraŭ la senpripensa sento de feliĉa normalo ĉe tiuj “ni”, kiuj por “ili”, por “tiuj ekzilitoj”, havas nur kompaton. Aliaj inter vi preferos reliefigi la rolon de la adoptaj gepatroj. Rolas en nia medito ne nur tiuj, kiuj depetis infanojn de peranta instanco sialanda aŭ alilanda. Ni agnoskas la valoran strebado ankaŭ ĉe la vicpatroj/patrinaj en familioj “kunmetitaj” post rompiĝoj de pli fruaj geedzeco. Vere festindas la bunteco de niaj primeditatoj.

Efektive, tiaj elektoj – do la sperto varti biologie nepropran infanon kiel persone propran – oftigis en niaj socioj. Sed nia kompreno ne ĉesis atribui ian “naturecon” al sendivorca, senadopta familio. La faktoj kuras antaŭen, sed postrestas niaj psikoj.

Kiam ni kantas la movadan himnon kaj uzas la vortojn “unu grandan rondon familian”, ĉu ni restu katenitaj al la klasika bildo de familia feliĉo – kaj de fabele monstraj vicpatrinaj? Ĉu ne estas evidente al ni, ke pro tiu sama logiko de “natureco” bazita ekskluzive sur naskoj kaj sur “la natura familio” – kaj sur la klano, la nacio, kaj aliaj

grandigoj de la familia natureco – multaj restas malamikaj al artefarita lingvo?

Familia kunvivado ne okazas de si mem. Ĝi estas io prizorge farata. En ĉiu moderna familio, ni konscie muldas nian interkonduton al la psikaj bezonoj de niaj samhejmanoj. Funkciigadi hejmon ne estas simple. Por interkondukti tiel gracie, ke neniu konstante spertu troan streĉiĝon, ni glatigadas niajn movojn, “komprenante unu la alian”. La feliĉa familio ne estas natura, sed kultura – la reciproka donacado de komprenemo. En tiu ĉi tema regiono indas memori la sloganon kreitan de Julio Baghy en “La verda koro”: “kulturo = homa kompreno”. Ĉi-rilate Esperanto, kiu plej evidentigas la konscian rolon de la uzantoj, estas modelo por la aliaj lingvoj, kie oni mitas pri la natureco. Ni akcelu en etnaj lingvoj la konsciigon pri tio, ke familion aŭ etnon feliĉan faras la interglatiga fortostreĉo. Eks pri la ‘naturaj’ samsangejoj de ĉiuj tiuj sangaj mitoj, kiuj tiel longe fortentas nin de la serioza, plena homiĝo!

Senpagaj Libroj...

Ĉiuj kiuj loĝas ekster Brazilo rajtas ricevi niajn librojn, en Esperanto, tute senpage. Sufiĉas nur sendi vian kompletan nomon kaj poŝtadreson al editora_lorenz@uol.com.br



En la Esperanto-biblioteko de nia institucio, Bona Espero, la serio de "Almanako Lorenz" estas inter la plej konsiderataj dokumentoj, kiujn konsultas kaj legas niaj internaciaj gastoj kaj volontuloj.

Ni sincere gratulas vin pro la persista kaj ĉiam tre interesa agado! Admirinda estas la vasta reto de porokazaj kunlaborantoj el la plej diversaj mondkonceptoj. Same la "Komunikoj" eldonataj regule estas ĉiufoje inspiraj.


Nepre vi devas daŭrigi sur tiu vojo semi la bonan novaĵon!



Giuseppe kaj Ursula Grattapaglia - Italio kaj Germanio

SE VI VOLOS RICEVI LA PDF-AN VERSIO DE ALMANAKO LORENZ, SKRIBU AL NI:
editora_lorenz@uol.com.br

**NI RICEVIS
 KAJ
 REKOMENDAS**



KUNLABORU! – Membrigu ĉe ASOCIO LORENZ kaj helpu la disvastigon de Esperanto kaj Spiritismo en la tuta mondo!

COLABORE! – Torne-se membro da ASSOCIAÇÃO LORENZ e auxilie a divulgação do Esperanto e do Espiritismo em todo o mundo!

MONATA GAZETO
 por esperantistoj-handikapuloj
 + suplemento ANTAŬEN

Eldonas AEH – Asocio de esperantistoj-handikapuloj en Pardubice

Kontakto: aeh@esperanto-aeh.eu



Svaz zdravotně postižených esperantistů a Esperantský kroužek Dr. Josefa Hradila
srdečně zvou na jazykový seminář

pro:
esperantisty (začínající i pokročilí),
příznivce procházek v kouzelné krajině Českého ráje



Seminář se bude konat v hotelu Kavka v Malé Skále v termínu 26. - 29. 3. 2020

Příhlášky a informace:

Lenka Angelová
tel. 775 323 803
Langelova@seznam.cz
e-mail: aeh@esperanto-aeh.eu
<http://esperanto-aeh.eu>

Jindřiška Drahotová
tel: 720 652 320
e-mail: drahotovaesperanto@seznam.cz
www.mboleslav.cz/esperanto/

V případě nepříznivého počasí si ve volném čase
vyrobíme malou, ale užitečnou maličkost
<http://evinateller.cz>

KAJ LA CELOJ?

Ĉiam ekzistis homoj nedifineblaj, kiuj malbonfaris neniun sed ankaŭ al neniuj bonfaris.

Rigardate el ĉi vidpunkto, la aferoj surteraj necesigas prudentan interpreton por ne perdiĝi en senutileco.

Al homo estas permesate sin dediĉi al literaturo aŭ al honestaj mondaj negocoj, kaj neniuj povos malkonfesi la laŭdindan karakteron de tiuj, kiuj konscie elektas sian individuan agadon sur la kampo de la utilaj servoj. Estas tamen juste koni la celojn de tiu, kiu skribas, aŭ la intencojn de tiu, kiu negocas. Kiel utilos al la unua la produktado de longaj verkoj, plenaj de vortaj ornamaĵoj aŭ teoriaj entuziasmoj, se iliaj vortoj malplenas je edifa instruo por la eterna destino de la animo? Kion profitos la komercisto el sia grandega riĉaĵo, akirita per laboremo kaj kalkulo, se ĝi stagnas en liaj kaso, atendante la malsaĝaĵojn de lia idaro? En ambaŭ situacioj oni ne povos

diri, ke tiaj homoj intencis nelicajn farojn; ili tamen perdis altvaloran tempon, forgesante, ke malplej signifaj aferoj portas edifan celon.

Laboristo konscia pri siaj respondecoj ne deflankiĝas de la rektaj vojoj.

Ekzistas multa aflikto kaj amareco en la laborejoj de la surtera perfektigo pro tio, ke ĝiaj servistoj intencas, antaŭ ĉio, materialajn gajnojn, forgesante la celojn, al kiuj ili estas destinataj. Dum tiel okazas, intensiĝas projektoj kaj eksperimentoj, sed ĉiam mankas justa kaj necesa edifado.

Fonto: Pão Nosso, de Francisco Cândido Xavier (Spirito Emmanuel) Reformador, Septembro de 2019, p. 22

